

La naskiĝo de « Heroldo de Esperanto »
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 455, 1981.02.19 & 21

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

En sia aŭtobiografio titolita **Ĉiu - Ĉiun**, Teo Jung rakontas, kiel naskiĝis en 1920 lia gazeto "Esperanto Triumfonta", kiu poste ŝanĝis sian titolon al "Heroldo de Esperanto". Per citaĵoj el la koncernaj ĉapitroj, ni provas doni al vi ideon pri la ekvivo de unu el niaj plej gravaj esperanto-gazetoj. Jen ni citas:

A.- "Ni revenu al la jaro 1920, kiam jam ekzistis inflacio, kvankam ankoraŭ en relative modera formo.

Cl.- "Unu usona dolaro egalvaloris tiam proksimume 30 germanajn markojn. En la komenco la kurzo ankoraŭ ŝanceliĝis, kaj en iuj momentoj eĉ ŝajnis, ke la marko, almenaŭ parte, revalorigis. Sed tiu ŝajna revalorigo ne povis ŝanceli mian projekton.

A.- "Por realigi ĝin, mi unue aĉetis kvanton da novaj prestipoj, inkluzive de supersignitaj literoj.

Cl.- "Due mi desegnis per krie dikaj literoj aplomban titolon: "Esperanto Triumfonta".

A.- "Tiu titolo devis aperi unue sur reklama prospekto, per kiu mi intencis anonci la projektatan eldonadon de la nova gazeto, kaj poste sur tiu gazeto mem.

Cl.- "Trie mi skribis al samideanoj en diversaj partoj de la mondo, petante plumajn kontribuaĵojn por la unua numero de la gazeto.

A.- Teo Jung daŭrigas skribante:

"Poste mi presis kun mia frato kelkajn milojn da ekzempleroj de la reklama prospekto. Ĝia teksto estis same aplomba kiel la titolo, eĉ iom fanfarona sed klarega. La prospektojn mi dissendis kaj atendis la rezulton.

Cl.- "Dume mi redaktis kaj, kun mia frato, mankompostis kaj presis la unuan specimenan numeron de gazeto... Tiun presadon oni imagu ne kiel modernmaŝinan laboron... Ĝi, kontraŭe, estis ekstreme primitiva, preskaŭ ankoraŭ Gutenberga.

A.- "Kvankam nia presilo iam estis al mia patro vendita kiel rapidpresilo, la maksimuma kvanto per ĝi atingebla estis 500 Kopioj en unu horo: dum unu persono, havanta sian lokon antaŭ la maŝino, enmetadis la foliojn, la alia, staranta flanke de ĝi, devis turnadi la svingradon.

Cl.- "Mia frato kaj mi alterne plenumis tiujn du funkciojn. Motoron ni tiam ne posedis; pli modernan kaj pli grandan presmaŝinon kaj elektromotoron ni akiris nur en la sekvanta jaro.

A.- "Cetere ni povis presi sur nia malnova maŝino samtempe nur po du paĝojn de la gazeto. Por pretigi la tutan specimenan numeron 8-paĝan, ni devis post preso de la unuaj du paĝoj ankoraŭ trifoje ŝanĝi la kompostajon en la maŝino, kaj por presi 2500 ekzemplerojn de kompleta 8-paĝa numero, ni devis tridekmil-foje turni la svingradon.

Cl.- "En la aplomba prospekto, dissendita komence de marto 1920, mi skribs: "Ĉiu popolo posedas sian gazeton, kiu pledas por ĝiaj specialaj interesoj; en ĉiu civilizita lando ekzistas en ĉiu grandeta urbo ĉiutaga ĵurnalo, en ĉiu iom respektinda loko semajna gazeto; ec la plej malgranda popolo havas almenaŭ unu grandan ĵurnalon. Sole la popolo esperantista tian ne havas."

A.- "Poste mi klarigis en la prospekto la cirkonstancojn, kiuj akcelis la eldonadon de tia gazeto esperantista: unue la fakto, ke mi estas profesia gazet-eldonisto kaj posedas propran presejon, kvankam en tiu tempo ĝi estis pli ol modesta; due la cirkonstanco, ke tiutempe regis en Germanujo inflacio, kiun mi intencis profitigi por la eldonado de projektata Esperanto-gazeto.

Cl.- Laŭ la sama prospekto, "Esperanto Triumfonta" devis fariĝi "la estonte ĉiutaga ĵurnalo de Esperantujo", "vera spegulo de la tuta mondlingva movado". Kiel eble plej rapide informi pri ĉio raportinda el tiu movado kaj, per sia granda formato kaj minimume semajna aperado, impresi ankaŭ la ekstermovadan publikon, jen kio devis esti ĝiaj ĉefaj taskoj. Kaj la fincelo: la lingva interkompreniĝo kaj, per ĝi, laŭeble amika kunlaborado de homoj kaj popoloj ĉiunaciaj.

A.- Teo Jung konkludas tiun rakonton pri la eklanĉo de sia gazeto dirante: "Kiom ajn primitivaj estis la cirkonstancoj, sub kiuj, kaj la rimedoj, per kiuj naskiĝis tiu numero, aŭ eble ĝuste pro tiuj primitivaj cirkonstancoj, ĝia pretiĝo ŝajnis al mi – kaj verŝajne ĝi fakte estis - la praktika rezulto de revo daŭrinta precize dek jarojn.

Cl.- Pri la unuaj rezultoj Teo Jung tiel rakontas: "Kvankam la specimena numero de "Esperanto Triumfonta" vekis ĉe la esperantistaro grandan entuziasmon, kaj atingis min amaso da gratuloj kaj laŭdoj, la vortojn de la plej multaj gratulintoj kaj laŭdintoj ne akompanis la atenditaj abonoj. Antaŭ ol oferi sian monon, la samideanoj prefere atendis la efektivigon de la promesoj.

A.- Teo Jung decidis ŝanĝi sian originan planon, eldonante la gazeton provizore nur dufoje monate kaj en pli modesta formo: kvar-paĝa kaj simplapapera; nur la granda formato restu.

Cl.- Ni ree citu lin: "Sekve aperis la 1-an de julio 1920 duafoje unua numero de "Esperanto Triumfonta". Ĉefloke sur la unua paĝo de tiu numero mi metis la devizon: "Persisti ĝis Triumfo". En aŭgusto mi eldonis nur unu numeron, duoblan, kun detala raporto de Margarete Krestanov pri la 20-a Universala Kongreso de Esperanto en Hago. En septembro aperis du numeroj, kaj en oktobro unu.

A.- "Intertempe la abonantaro iom post iom estis kreskinta al iom pli ol duona milo. Tiam mi riskis la grandan salton: kun la numero de 1-20-a de novembro 1920 komenciĝis la ĉiusemajna aperado, kaj de tiam ĝis la likvido de nia entrepreno fare de la Hitlera Gestapo en junio 1936 la semajna aperado jam neniam estis interrompita: "Esperanto Triumfonta" - ekde la 3-a de januaro 1925 nomita "Heroldo de Esperanto" aperis kun reguleco de horloĝo ĉiu-semajne, dum iu periodo (de decembro 1924 ĝis la fino de 1925) duonsemajne, kaj dum la Universala Kongreso en Nurnbergo (1923) eĉ ĉiutage.

Cl.- "Post la semajngigo de "Esperanto Triumfonta" la abonantaro rapide kreskis. Kiam, la 3-an de septembro 1922, aperis la 100-a mamero, la nombro de la pagantaj abonantoj estis jam 2900 kaj la regula eldonnombro 3500.

A.- Teo Jung konkludas tiun ĉi rakonton pri la ekvivo de sia gazeto dirante: "la ekzistado de "Esperanto Triumfonta" dependis ofte de fadeno facile rompiĝonta; sed ĉiam la neŝancelebla fido, optimismo kaj adaptiĝemo de mi mem kaj de miaj plej proksimaj kunlaborantoj - kaj, mi ĝojas povi diri ĝin, la malavara subteno fare de kelkaj idealismemaj samideanoj kaj samideaninoj - savis ĝin de la morto.

C1.- La sekvon de tiu granda aventuro vi povas legi en la libro **Ĉiu-Ĉiun**, de Teo Jung, eldonaĵo de TK.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond citis erojn el memoraĵoj de Teo Jung. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*